



subneĝa tegmento  
en Provenco

# espéranto

## Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio n° 103 - vintro 2015 / 2016

### federacia retejo

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

### nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

### prezidanto

Pierre Oliva  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### baza kotizo por aliĝo (kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :  
"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la

### kasisto

Nicole Lafitte  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
61 Montée du Castelar  
83460 Taradeau  
06 42 19 68 51  
[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

**31-a de Marto 2016**

bonvolu sendi al la supra retadreso  
antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

### Vorto de la Prezidanto

#### Feliĉan novan jaron al vi kaj al viaj familianoj !

Sanon, feliĉon kaj sukcesojn en via poresperanta agado !  
Por nia federacio, bona novaĵo en la ĵus finiĝinta jaro estis, ke la nombro de pagintaj membroj superis la centon. Tio eblis danke al la laboro de vi ĉiuj. Ni devos nun daŭrigi, ĉar ni troviĝas sur bona vojo.  
En la proksima estonto, ni devos labori por sukcesi en la organizo de la Nacia UFE-kongreso en Marsejlo, kiu okazos en Majo.  
Denove : bonan jaron al ĉiuj !

Pierre Oliva

### Atentu ! / Attention !

#### Ne forgesu pagi la aliĝkotizon - 6 € - al Espéranto-Provence

por la jaro 2016, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasistino, *Nicole Lafitte* (aliĝilo aldonita rete al la gazeto ; printu ĝin aŭ plenigu ĝin por reta sendo. Se vi preferas paperan version, petu tion telefone aŭ mesaĝe de *Pascal Vilain*). **Dankon !**

***N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto-Provence pour l'année 2016, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte (formule d'adhésion joint à ce bulletin sous forme de document numérique ; imprimez-le ou complétez-le pour un envoi électronique. Si vous préférez une version papier, demandez-la par téléphone ou message à Pascal Vilain). Merci !***

### Federacia agado

**Nia federacia membro-kunveno okazos kadre de  
la Nacia Kongreso de Espéranto-France  
(5-a ĝis 8-a de Majo 2016 en Marsejlo)**

Bonvolu jam noti tiujn eventojn en vian agendon.  
(*Pliaj informoj aperos en la venonta numero de via gazeto*)

En la sekvaj paĝoj, bonvolu legi la moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2015. La kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo aperos en la printempa numero de la gazeto.

## Federaciaj raportoj - 2015

### 1 - Morala raporto (*Pierre Oliva*)

2015 estis grava jaro por nia Federacio.

Multaj el ni partoprenis en la Universala Kongreso en Lillo, kiu vekis grandan intereson tra la mondo. Estis grandega evento, eĉ se en nia Provenco, ni ne sufiĉe reklamis pri ĝiaj graveco kaj amplekso.

Pri la federacio, sukceso estas, ke pli ol cent samideanoj aliĝis al ĝi; espereble pluus tiu pozitiva evoluo.

En la lastaj monatoj de la pasinta jaro, ni devis multe labori por la preparado de la maja Kongreso de *Espéranto-France* en Marsejlo.

La malfacilaĵoj en la trovo de taŭga kongresejo, en la elekto de trafikaj programeroj, ktp. konsciigas al ni, ke

ni jam perdis multe da tempo, ne nur pro la multnombraj elekteblecoj koncerne la lokon, sed ankaŭ pro la multego da ricevataj mesaĝoj kun proponoj ne ĉiam realigeblaj. Bedaŭrinde rezultas el tio, ke nenio estas findecidita, kiam mi skribas ĉi tiujn vortojn, en la lastaj tagoj de 2015. Ni plu laboras kaj esperas, ke kiam vi legos ĉi tiun januaran gazeton, la plej gravaj decidoj koncerne la kongreson estos jam alprenitaj. Krom tio, nia federacio progresas kaj plifortiĝas, tio estas la ĉefa afero.

### 2 - Agada raporto (*Pascal Vilain*)

#### 1 - Membraro :

*Espéranto-Provence* havas 104 membrojn je la 31a de Decembro 2015.

37 estas membroj de *Espéranto-France* (inter ili, 11 estas ankaŭ klubo-membroj)

19 estas nuraj Federacio-membroj

59 estas klubo-membroj

sume : 115 – 11 = 104

#### 2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

##### 2-1 deklaritaj asocioj

**04 - Manosque** - EKEM (Esperanta Kulturo en *Manosque*): 10 federaciaj membroj

prez. : *Jean-François Fausser* – sekr. : *Clément Fausser*  
– kas. : *Joseph Grammatico*

**05 - Gap** - *Espéranto-Gap* : 6 federaciaj membroj

prez. : *Julien Nicolas* – sekr. : neniuj – kas. : *Jean-louis Gobeau*

**13 - La Roque-d'Anthéron** : *Espéranto-La Roque*

**13 - Marseille** : 5 federaciaj membroj

prez. : *Thierry Spanjaard*

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.overblog.com>

**13 - Miramas** : G.E.M. (*Groupe Espéranto Miramas*)

**83 - Fréjus - Saint-Raphaël** : *Espéranto-Club Saint-Raphaël / Fréjus* : 28 federaciaj membroj

prez. : *Denise Loisel* – sekr. : *Monique Prezioso* – kas. : *Christine Graissaguel*

**83 - Le Beausset - Espéranto-Le Beausset** : 8 federaciaj membroj

**84 - Avignon** - KECA (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono) : 2 federaciaj membroj

#### 2-2 antenaj grupoj de *Espéranto-Provence*

13 - *La Ciotat* ; 84 - *Carpentras* ; 84 - *Orange*

#### 2-3 individuaj membroj

04 : en *Castellane* ; 06 : en *Guillaumes, Cagnes-sur-Mer* ; 13 : en *Le Tholonet, Aix-en-Provence, Belcodène*

83 : en *Taradeau, La Garde, Pignans, Saint-Mandrier, Toulon* ; 20 : en *L'Île Rousse* ... (listo ne kompleta)

#### 3 - Administro :

##### membrokunveno :

Ĝi okazis en *Les Issambres* la 8an de Marto.

22 partoprenintoj + 11 senditaj rajtigiloj

Demisiis el la federacia komitato : *Claudie Demongeot*. Eniris la komitaton : *Nicole Lafitte*

##### komitatkunsidoj :

> Januaro 25 : *La Ciotat* (ĉe *Renée Triolle*)

> Marto 8 : *Les Issambres* (post la membrokunveno)

Okaze de tiu kunsido, la komitatestraro estis renovigita :

##### estraranoj (4) :

prezidanto : *Pierre Oliva*

sekretario : *Pascal Vilain*

kasisto : *Nicole Lafitte*

helpkasisto : *Michel Cerisay*

gazetrespondeculo : *Pascal Vilain*

reprezentanto de nia federacio ĉe *Espéranto-France* : *Pascal Vilain*

## aliaj komitatanoj (5):

*Monique Arnaud, Franz Mimmersheim, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez*

> Junio 21 : *Taradeau* (ête *Pascal Vilain*)

> Oktobro 18 : *Marseille* (ête *Thierry Spanjaard*)

## 4 - Instruado :

### - kursoj

> *Fréjus – Saint-Raphaël* : unufoje semajne por praktikantoj (*Jean-Claude Roget*) + ĉiulunde por komencantoj (*Christine Graissaguel*)

> *Draguignan* (subgrupo de la klubo *Fréjus*) : unufoje semajne por komencantoj (*Jean-Claude Roget*) – la kurso ne plu aktivas fine de la jaro.

> *Le Beausset* : sabate matene – 1a kaj 2a niveloj

> *La Ciotat*

> *Marseille*

> *Avignon*

> *Manosque* : Esperanto-kursoj kun klasoj (CM1) en *Sainte-Tulle*, kadre de la TAPS ("*Temps d'Activités Péri-Scolaires*")

### - staĝoj :

> Marto 7/14 - *Les Issambres* (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno

> Novembro 28/29 – *Le Beausset* (83) : Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de *Nicole Lafitte, Renée Triolle, Patrick Lagrange kaj Daniel Moirand*).

### - ekzamenoj :

> Junio 14 – *Marseille* : FEI-ekzameno 1a-grada. Sukcese partoprenis 3 kandidatoj.

## 5 – Informado – komunikado :

> EKEM (*Manosque* - 04) : deĵorado en la Domo de la Asocioj la unuan kaj trian sabatojn, ĉiumonate dum la tuta tago ekde la 9a45.

> Aprilo 2 – en Marsejlo (13) : prelego pri Esperanto okaze de la lanĉo de «Lingva Kafejo», kie Esperanto estas regule parolata, ĉiumonate, la unuan ĵaŭdon ekde la 18-a. (*Équitable Café – 54 cours Julien, 13006 Marseille*)

> Majo 11 – radio-elsendo pri Esperanto ĉe «*Radio Dialogue*» (*Marseille, Aubagne, Aix, ...*), okaze de la ĉiusemajna magazino "Morgaŭ la Tero". Temo : «Esperanto, ĉu lingvo de paco aŭ nur komunikilo?», kun partopreno de *Jeanine Ratouchniak kaj Thierry Spanjaard*.

> Majo 27/31 – *Marseille* (13) : Esperanto-Semajno. Multaj programeroj proponitaj al la ne-esperantista publiko.

> Junio 27 - *Manosque* (04) : «*Manosque à l'Asso*» : Partopreno de EKEM

> Septembro 6 - *Fréjus* : «Forumo de la asocioj»

> Septembro 6 – *Marseille* (13) : «Forumo de la asocioj»

> Septembro 12 – *La Ciotat* (13) : «Forumo de la asocioj»

> Septembro 12 – *Le Beausset* (83) : «Forumo de la asocioj»

> Septembro 12 – *Le Castellet – Sainte-Anne d'Evenos*

> Septembro 26 – *Manosque* (04) : «*Journée Porte ouverte sur l'espéranto*» kadre de «*Journée Européenne des Langues*» ; partopreno de EKEM

> Oktobro 15 – *Montfavet* (84) : prelego de *Thierry Saladin* pri «*L'Union Européenne et les langues : mythes et réalités*».

## 6 – Klubaj eventoj

> Januaro15 - Avinjono (84) : reĝkuka festo

> Januaro 18 - *Fréjus – Saint-Raphaël* (83) : reĝkuka festo + membro-kunveno

> Januaro : *La Ciotat* (13) : reĝkuka festo + membro-kunveno

> Marto 24 - Marsejlo (13) : prelego de *Aleksandro Melnikov* (ruso) pri «Eterna Rusio : nigra-blanka ĉiel-arko».

> Marto 25 - *La Ciotat* (13) : *Aleksandro Melnikov*

> Marto 25 - *Le Beausset* (83) : *A. Melnikov* vizitis la turismoficejon.

> Marto 31 - Marsejlo (13) : prelego de *Firdaŭs kaj Tatiana Choukourov* (getaĝikoj) pri «Taĝikio, hieraŭ kaj hodiaŭ».

> Marto - *La Ciotat* (13) : prelego de *F. kaj T. Choukourov*

> Marto - *Le Beausset* (83) : *F. kaj T. Choukourov* vizitis la turismoficejon.

> Majo 24 - *Fréjus - Saint-Raphaël* (83) : tradicia printempa pikniko de la loka klubo

> Majo 27/31 – *Marseille* (13) : Esperanto-Semajno.

> Junio 21 – *Avignon* (84) : tradicia pikniko en *Saint-Antoine*, vilaĝeto de la urbo *L'Isle-sur-la-Sorgue*.

> Junio 28 - *Fréjus - Saint-Raphaël* (83) : komuna manĝado kaj distra posttagmezo en *Les Issambres*

> Novembro 5 – Avinjono (84) : Ĝenerala kunsido de KECA

> Decembro 8 - *Marseille* (13) : oficiala enmanigo de la diplomoj al la tri sukcesintoj de la junia FEI-ekzameno,

samtempa celebrado de la Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj de la datreveno de la Zamenhof-naskiĝo.

> Decembro 12 - *Fréjus - Saint-Raphaël* (83) : Zamenhof-tago

> Decembro 13 – Avinjono (84) : Zamenhof-tago kun prelego de *Mari-Roza* kaj *Pascal Vilain* pri «Amikejo, la forgesita lando», sekvita de teatra spektaklo.

## 7 – Movadaj eventoj

> Majo – Kvinpetalo (*Bouresse*) : «staĝo pri ĉiĉeronado» ; partoprenis *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva*

> Majo 15 – *Neufchâtel* (Svisio) : «Tria Tutmonda Kolokvo pri instruado de Esperanto» – *Monika Arnaud* prezentis la libreton «Rakonto pri tarofolioj», verkitan de afrikanoj dum la ILEI-Konferenco en *Porto Novo* (Benino – 2008)

> Julio 17/25 : «48-a ILEI-konferenco» en Ostendo (Belgio). Partoprenis *Monika Arnaud*

> Julio 25 – Aŭgusto 1 : «100-a Universala Kongreso de UEA» en Lillo. Partoprenis kaj helpis multaj federaciaj.

> Oktobro 3/10 : «23-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo» en *Rosas* (Hispanio). Partoprenis *Monique* kaj *Laurent Prezioso*.

## 8 – Kulturaj eventoj

> Januaro 15 - *Taradeau* (83) : «Urbestraraj bondeziroj al la vilaĝloĝantaro», en kiu *Pascal Vilain* oficiale transdonis al la urbestro la ateston «Esperanto-vilaĝo»

> Januaro 22 - Avinjono (84) : partopreno de *Avignon-Espéranto* en «*Les petits plats du monde*», tagmanĝo proponita de la centro *ESC Croix-des-Oiseaux*, laŭ la temo «Supoj de la Mondo».

> Februaro 21 - *La Ciotat* (13) : «*Journée Mondiale de la Langue Maternelle*» : amika kaj internacia kunveno en *le Grand Portique*.

> Marto 26 - Avinjono (84) : partopreno de *Avignon-Espéranto* en «*Les petits plats du monde*», laŭ la temo «*Manĝaĵoj el Reunio*».

> Aprilo 16/19 - *La Ciotat* (13) : «Festivalo de dividita poezio» ; partopreno de *Renée Triolle*.

> Majo 27 - Parizo (75) : «Omaĝo al *Jean Zay*» kun partopreno de *Monika Arnaud*.

> Junio 4 - Avinjono (84) : partopreno de *Avignon-Espéranto* en «*Les petits plats du monde*», laŭ la temo «Afrika kuirarto».

> Junio 6 - *Manosque* (04) : «akcepto de la novaj *Manosque*-anoj» ; partopreno de EKEM.

> Junio 24 - *La Ciotat* (13) : «Alternatiba» kun partopreno de esperantistoj el *La Ciotat*.

> Junio 28 - *Gap* (05) : «*Fête de la Paix*»

> Septembro 12/13 - *Embrun* (05) : «*Foire Génépi*»

> Septembro 24/28 - *Manosque* (04) : «*Correspondances de Manosque*» ; partopreno de EKEM

> Novembro 3/19 - Parizo (75) : «*38ème Conférence Générale de l'UNESCO*» ; partopreno de *Renée Triolle*, por UEA, kaj de *Monika Arnaud*, por ILEI.

## 9 – Diversaj novaĵoj

> forpasoj : *Madeleine Delagneau* kaj la edzo de *Nina Gouriou*.

> *Franz Mimmersheim* modernigis la aspekton de nia TTT-ejo kaj faciligis la enigon de artilokoj en la diversajn rubrikojn.

> Marto ĝis Septembro : *Alain Rémy* denove biciklis tra Eŭropo kaj renkontis multajn esperantistojn el diversaj landoj. Eblis sekvi liajn aventurojn sur lia blogo dediĉita al tiu vojaĝo.

> Artikolo de *Thierry Spanjaard* pri naturismo aperis en la aprila numero de *Monato*.

> *Anita Collomb* kaj *Pascal Vilain* partoprenis en itala poezia konkurso : «*Poezio el ĉiuj ĉieloj*».

Iliaj poemoj aperis en la dua antologio de la konkurso.

> artaj ekspozicioj kun artaĵtitoloj aŭ poemoj en Esperanto, proponitaj en Parizo (75) de *Bernard Briançon*, ano de la klubo de *Le Beausset*, kaj en *Valbonne* (06) de *Pascal Vilain*.

> *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva* iĝis membroj de la administra konsilio de «*Espéranto-Info*».

## 10 – venontaj okazaĵoj

> Marto 5/12 – *Les Issambres* (13) : Mediteranea Esperanto-Semajno

> Majo 5/8 - *Marseille* (83) : Nacia UFE-kongreso ; kadre de ĝi okazos la Membro-Kunveno de nia federacio.

Li diris...



**Maurice Genevoix**

(1890 – 1980)

Écrivain et essayiste

Membre de l'Académie française

« L'espéranto est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment, il est propre à permettre, par conséquent, l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus ombrageux et les plus particularistes, et il ne peut pas porter ombrage aux fidèles des langues nationales... »

### 3 - Financa raporto (Nicole Lafitte)

bilan financier année 2015							
Recettes	avant			après			Dépenses
	20/04/15	21/04/15	totaux €	20/04/15	21/04/15	totaux €	
cotisations	318	239	557	envoi journal	463		463
dons	48		48	déplacements	234	423	657
Espéranto-France	127		127	internet		45	45
stage Le Beausset		1164	1164	stage Le Beausset	150	1179	1329
examen Marseille		16	16	correction Paris		29	29
				action CRCA		50	50
				frais postaux		21	21
				anim.sem.Marseille		100	100
perte de l'exercice			782				
			-----				-----
			2694				2694

disponible compte courant : 968€  
livret épargne : 3250€  
TOTAL : 4218€

## El la regionaj asocioj

-----

### 04 - EKEM - Esperanta Kulturo en Manosque



À l'occasion de la Semaine de la Solidarité qui s'est déroulée à la MJC de Manosque du 17 au 28 novembre, EKEM a pu exposer un panneau : «Espéranto : la langue de la solidarité», ce qui lui a permis de rencontrer de nombreux autres groupes et d'entrer ainsi un peu plus dans le cercle des associations reconnues.



Le samedi 9 janvier, à la Maison des Associations, s'est tenue l'assemblée générale d'EKEM, suivie des traditionnels pot de l'amitié et galette des rois.

Il a été décidé de nommer **José Grammatico** Président d'honneur de l'association.

### Alvoko por la Internacia Virina Tago (8-an de Marto 2016)

Ĉijara temo : "La estontecon malfermas ni mem. Trovu la veron el abundaj informoj." El la atombombita urbo Hiroŝimo, ni alvokas ĉiujn en la mondo al neperforta solvo de la problemoj por paco. Bonvolu sendi mesaĝon kun via opinio por nuligi nuklearmilojn kaj militojn. La ricevitaĵojn ni ekspozicios en kunvenejo de la urbo. Sendolimdato : 10-an de Februaro. Mesaĝo sur leterfolio maksimume A-5 formata, kun la jenaj informoj : nomo, sekso, aĝo, profesio, urbo, lando. Kontaktadreso: OSIOKA Taeko - Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio - osioka@mua.biglobe.ne.jp



### 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Mardon la 8-an de Decembro, post la kursoj ĉe *CIRA*, okazis enmanigo de diplomoj al la tri kuraĝuloj, kiuj en Junio trapasis la unuagradan ekzamenon de FEI. La dato estis elektita por kunfesti la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj (la 10-an de Decembro) kaj Zamenhof (15-an de Decembro).

Bela okazo memori, ke ni, esperantistoj, ĉefe batalas por artikolo 2 : "rajto je lingvo", art.26 : "edukado por interkompreniĝo" kaj art.27 : "rajto partopreni la kulturen vivon kaj la progreson de scienco".

Bela okazo ankaŭ reklami por la ĵus eldonita historio de la literaturo en Esperanto, ĉefa moto de Zamenhof ; eĉ en la Unua Libro aperas poeziaĵo : «Ho, mia kor'», kiujn la ĉeestantoj povis aŭdi antaŭ la aperitivo kaj amikaj diskutoj.



de maldekstre dekstren  
Marc, Laurent kaj Lydia



### 83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

#### Paroladeto de *Pascal Vilain* ĉe la strata nomplato "*Rue Zamenhof*"

Karaj gesamideanoj kaj geamikoj,

Ĉu via menso plu ĝojas pro la mirindaj memoraĵoj, kun kiuj vi revenis el la Lilla Universala Kongreso, se vi havis la bonan ŝancon partopreni en ĝi... aŭ ĉu via koro plu ploras pro la teruraj eventoj, kiuj antaŭnelonge skuis ne nur Parizon, sed ankaŭ nian landon kaj la tutan mondon ?

Unuflanke : 2 698 gesamideanoj el 80 landoj spertis - sed pri tio ili jam certis antaŭ ol veni - la unikan efikecon de sia Internacia Lingvo, kiu ebligas tujan interkomprenon, sen perado de interpretistoj aŭ tradukistoj. Tio estis pruvo plia – kvankam por ni tute ne bezonata – de la genia invento, kiun D-ro Zamenhof donacis al la homaro.

Aliflanke : milito frapas ĉe nialanda pordo kaj aliloke, iniciatita de stultegaj fanatikuloj, kiuj nenion komprenis el sia propra religio.

Lillo : pinto de ĝojiga interpopola kompreniĝo, danke al projekto, kiu bedaŭrinde restas plu nekonata, pri-fajfata, neglektata...

Parizo : pinto de neklarigebla intercivilizacia hato, kiu bedaŭrinde restas plu aktuala, nutrata, disvastigata...

Okaze de la Parizaj atencoj, mi ofte legis, tie kaj tie, reagojn de personoj, kiuj rifuzas la vortojn «preĝo» kaj «standardo». Ili ja foje montris, en la historio, siajn malvirtojn.

La vorto «preĝo» sendube pensigas pri la religioj kaj ĉiuj problemoj, kiujn ili kreis... dum la vorto «standardo» sendube pensigas pri la naciismoj kaj ĉiuj militoj, kiujn ili naskis.

Sed mi ŝatus rememorigi al vi, ke ambaŭ vortoj troviĝas en la titolo de la fama poemo «Preĝo sub la verda standardo» de D-ro Zamenhof, kiun ni hodiaŭ omaĝas sub la ĉi-tiea stratŝildo, kiu portas lian nomon, kaj mi opinias, ke ĉiuj ni devus fari niajn kvar lastajn versojn de tiu poemo :

« Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro  
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro  
al frata la celo ni iru obstine  
antaŭen, senfine. »

Fine, ne forgesu, ke post tri tagoj, la 15-a de Decembro estos ne nur la dato de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof, sed ankaŭ tiu de la Esperanta kulturo, laŭ iniciato de unu el niaj signifaj verkistoj, *Julio Baghy*.

Ni provu tiam informi ne-esperantistojn pri nia lingvo, ties abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni elmontru, kiel nia movado disvastigas kulturverkojn de



Ĉe la strato Zamenhof, en Saint-Raphaël,  
sabaton la 12-an de Decembro

diversaj etnoj, ebligante al alilingvanoj la ĝuadon de verkoj alipopolaj.

Tio estu nia Zamenhof-taga kontribuo al justa, egalrajteca komunikado, kiu respektas lingvan, kulturalan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉecoj kaj rajtoj.

Dankon pro via atento, agrablajn komunan manĝadon kaj distran posttagmezon !



sekvis agrabla kunmanĝado  
en apuda restoracio



## 83 - Espéranto - Le Beausset

### Laborema kaj sukcesa

Tia estis la staĝo organizita de *Espéranto-Provence* en *Le Beausset* (83) la 28-an kaj 29-an de Novembro. La sukceso ŝuldiĝas al diversaj faktoroj : bona restadejo, en granda domo facile atingebla el la vilaĝo mem kun komfortaj ĉambroj ; bonaj kaj abundaj manĝoj - sen forgesi la kafopaŭzojn - ĉiuj majstre preparitaj de *Pierre Oliva*, kiun ni neniam tro dankos ; disponeblaj instruantoj, kiuj adaptiĝas al sia publiko ; libroservo provizita de « *Réinsertion et Espéranto* » kaj evidente staĝanoj (venintaj el *Saint-Raphaël*, *Aix*, *Avignon*, *Manosque* kaj *Marseille*).

Ĉifoje, estis proponitaj kvarnivelaj kursoj.

- nivelo 1 kun *Nicole Lafitte* por ĵusaj komencantoj.

- nivelo 2 pri praktikado kun *Renée Triolle*.

La elektita diskuttemo estis la 100-a Universala Kongreso en Lillo, por revidi kiel diri datojn aŭ horon, gvidi homojn tra la urbo, konsili aranĝon ktp., ĉiam surbaze de la kongresaj dokumentoj : jarlibro, kongresa libro, taga kuriero " Belfrido", mapoj de Lillo ktp. La kvaropo bone laboris, eĉ se kelkfoje mankis al ili imago por inventi fantaziaĵojn.

- nivelo 3 kun *Patrick Lagrange*.

La grupo aŭskultis kaj diskutis relativecon.

- nivelo 4 kun *Daniel Moirand*. La estigo de tiu kurso estis dubinda ĉar nur unu vere entuziasmiĝis pri la ideo lerni gramatikajn tiklaĵojn aŭ harfendi detalojn. Fine aliĝis kvin homoj, kiuj vere lerte kaj koncentriĝe laboris.

Jen pri tiu grupo raporteto de *Claudie Demongeot* :  
«*Daniel Moirand instruis al ni la E-an gramatikon per la libro Metropoliteno de V. Varankin (ruso, 1902-1938). Ni multe lernis pri la funkciado de la rusa lingvo ; ekzemple : artikoloj difinita aŭ nedifinita ne ekzistas. Ni profundigis niajn konojn pri la participoj, la uzado de "kies", ktp. Mi multe ŝatis labori kun Daniel, kiu estis tre kvieta kaj multe instruis al mi. Mi multe dankas vin pro la organizado, la bongustaj manĝaĵoj kaj la kursoj.*»

Ankaŭ la vespero estis dediĉita al la raportoj pri la 100-a Universala Kongreso. *Thierry*, *Marc* kaj *Michel* pruntis memorbastonojn kun siaj fotoj, kaj tute hazarde maloftis duoblaĵoj ĉar la koncernaj fotintoj ne interesiĝis pri la samaj programeroj. Sekve ni promenis tra la malnova urbo Lillo kaj ĝiaj restoracioj, tra la belga Bruĝo kun kanaloj kaj ŝtonaj stratetoj, tra la kongresejo kaj programeroj (de la Oficiala Malfermo kun salutoj de la landaj reprezentantoj, al la bunta Movada Foiro, diversaj spektakloj, koncertoj aŭ prelegoj).

Dankojn al ĉiuj partoprenantoj, kiuj riĉigis la staĝon per sia partopreno.

raportis *Renée Triolle*



niveau 1



niveau 2



niveau 3



niveau 4

## "Art et Espéranto"

Ekspozicio tiel nomita okazis en *Le Beausset*, de la 4-a ĝis la 9-a de Januaro. Organizis ĝin la loka klubo, kaj ĉefe ties motoroj *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva*, kun la aktiva subteno de la urbaj instancoj, kiuj disponigis ekspoziciejon en la "*Pôle Saint-Exupéry*" kaj zorgis pri la aŭfiŝoj.



Estis prezentitaj al la publiko artaĵoj de *Bernard Briançon*, membro de la Eo- klubo en *Le Beausset*, kaj de *Pascal Vilain* (sub la pseŭdonimo *Livani*), membro de la klubo en *Fréjus - Saint-Raphaël*.



*Bernard Briançon, inter urba konsilianino kaj Pierre Oliva*

*Marseille, Toulon, Saint-Mandrier... el la Pariza regiono... kaj eĉ simpatiega maljunulino el Japanio !* Dankon al ili, kiuj ne hezitis tiel subteni la organizantojn kaj ambaŭ artistojn, malgraŭ malfrua horo de vintra vespero.



*dum la inaŭguro*



## 84 - KECA- Kultura Esperanto-Centro de Avinjono

**Ĝenerala membro-kunveno** : ĝi okazis la 5-an de Novembro.

Inter la alprenitaj decidoj, du koncernas anojn de nia federacio : *Rose-Marie Quintin* forlasis sian prezidantan postenon sed restas en la komitato kaj plu gvidos la kursojn ; kaj *Michel Cerisay* eniris la asocian komitaton.

KECA konfirmis sian emon al sendependeco, tio signifas, ke ĝi aliĝas, kiel asocio, al neniu regiona, nacia aŭ internacia Esperanto-organizaĵo. Kompreneble, ĉiu klubano povas persone aliĝi al iu ajn E-o-asocio.

(*n.d.l.r.* : *Estus do plaĉe por nia federacio, ke multaj anoj de KECA tion decidu por 2016, ĉu ne ?*)

*informoj el la ligilo "Avignon-Espéranto"*

### Zamenhof-festo



*Mari-Roza prelegas*



*la geaktoroj*

Post bonveniga kaf-kaj-kukumado, dimanĉon la 13-an de Decembro ekde la 9-a, la programo komenciĝis per prelego de *Mari-Roza* kaj *Pascal Vilain* pri "Amikejo, la forgesita lando". La atenta publiko povis tiel ekscii pri la neŭtrala teritorio *Moresnet* (nun en Belgio), pri kalamaj minoj kaj pri tiea sesjara vivo de Esperanta ŝtateto. Sekvis komuna tagmanĝo antaŭ distra posttagmezo kun kantoj kaj tre sprita teatraĵo, en kiu lertege aktoritis preskaŭ ĉiuj (aŭ ĉu ĉiuj ?) membroj de la klubo.



*Rose-Marie kantigas la ĉeestantaron*

## UNESCO et ILEI

La 38ème Conférence Générale de l'UNESCO s'est tenue à Paris du 3 au 19 novembre 2015.

Comme d'habitude elle débute avec le débat de politique générale et ce sont près de 194 orateurs qui ont pris la parole.

Les thèmes principaux portent sur les objectifs 2015-2030 : le développement durable, les changements climatiques et leurs conséquences (l'UNESCO a été associée à la préparation de la COP21), une éducation pour tous de qualité avec des enseignants de qualité, la protection et la promotion de la diversité des expressions culturelles et du patrimoine mondial, la liberté d'expression et la protection des journalistes... avec comme point d'orgue un événement important : fêter le 70ème anniversaire de l'UNESCO!

Dès le mercredi matin, Monique Arnaud et Jean-Pierre Boulet, les représentants de ILEI, la Ligue Internationale des Enseignants d'Espéranto, ont circulé dans la grande salle et ce sont plus de 250 dépliantes qui ont été distribués à près de 50 délégations pendant la première semaine.



Monique Arnaud  
et Jean-Pierre Boulet  
en compagnie  
de représentants  
du Bouthan  
et de Haïti

Cette année nous nous sommes efforcés de nous adresser aux délégués dans leur langue nationale chaque fois que c'était possible. Nos documents étaient en 14 langues et nous étions sur la même ligne de conduite que l'Association Mondiale UEA.

Ceci nous a conduits à rencontrer des personnes isolées qui découvraient l'existence de l'espéranto avec un intérêt évident.

A la tribune, des langues comme le turc, le portugais, le serbe, le farsi, l'allemand ont été entendues. Si l'anglais a été utilisé une centaine de fois, le français l'a été près de 50 fois - les représentants de certaines délégations ont choisi de parler dans les 2 langues. Nous avons entendu 15 interventions en arabe, 14 en espagnol, 3 en russe et 2 en chinois - outre le représentant de la Chine, l'ex-président de la 37ème Conférence Générale a pris la parole en début de séance. Tous les participants s'accordent pour dire qu'il faut travailler ensemble dans le respect des différentes cultures, promouvoir la paix, la stabilité et le développement, travailler pour une compréhension, une solidarité et une coopération internationale.



stand "espéranto"  
de UEA  
durant la conférence  
à l'UNESCO

Grâce à UEA, nous avons pu tenir un stand et Renée Triolle a présenté l'espéranto mais dans de mauvaises conditions matérielles.

Lorsque les scouts ont présenté leur ONG le jeudi 12/11, Monique Arnaud a pu intervenir et a eu un très bon contact avec une responsable de Malaisie.

*compte-rendu de Monique Arnaud*



## Poezia konkurso



En la n° 102 de via gazeto, vi eble legis pri poezia konkurso : "Poezio el ĉiuj ĉieloj", en kiu sukcese partoprenis Anita Collomb kaj Pascal Vilain, kies tekstoj estas nun en la dua antologio de la konkurso. Pascal donace ricevis tiun libron kaj ceramikan memorplaton.



## Espero

(al ĉiuj elmigrantoj de la Mondo)

Kiam mi vidas, cirkaŭ mi,  
tiun mondon, maljustan, violentan,  
tiun amasan elmigradon de homoj  
fuĝantaj for de militoj, kruelaĵoj,  
malsato kaj malespero...

Tiam, mi memoras pri 1940-45,  
pri francoj fuĝantaj for de l' naziismo,  
pri italoj de l' faŝismo  
pri judoj el Pollando kaj aliaj lokoj  
pri mia hispana patro  
fuĝanta el diktaturo,  
pri mia bofilo veninta el Alĝerio...

Ĉiuj ni estas enmigrintoj  
aŭ ties idoj,  
nunaj aŭ praaj.

Kaj mi pensas :  
Iam, tio ŝanĝiĝu,  
Ni kreu Novan Mondon  
per Universala Solidareco,  
per Kompatema Akcepto  
de la Aliulo, tia kia li estas,  
ni unuigu niajn diferencojn.  
(Ekkiam regos am' sur ter'...)

Vi, popolo en ekzilo,

« Sekvante la kondukan fadenon  
de via Destino,  
Kun l' okuloj lumaj,  
de Esper' plenaj,  
iru antaŭen al Libereco ! »

(supraj kvin versoj el teksto de Brigitte Durin)



### ZEO-oj en PACA > 1 - Aix-en-Provence

La numero 101-a de via gazeto enhavis la jenan artikolon :

"Kio estas ZEO-o ? ZEO-oj estas Zamenhof/Esperanto-objektoj, t.e. stratoj, placoj, monumentoj, tabuloj kaj aliaj objektoj honore al Zamenhof aŭ Esperanto.

(info : Vikipedio.) En la sekvaj numeroj de via gazeto, vi povos legi pri la ZEO-oj en nia PACA-regiono."

Jen do unua serio de tiuj objektoj, kiujn mi prezentos, iom post iom, laŭ la alfabeto de la urboj, kie ili troviĝas. Nia vojaĝo komenciĝas en **Aix-en-Provence**, kie estas tri ZEO-oj : strata nomplato<sup>1</sup>, bushalteja nomplato<sup>2</sup> kaj granita slado<sup>3</sup>.

Pri la slado, jen kion skribis *Daniel Moirand*, tiama klubestro de la Eo-grupo de Aix, en la n° 98-a de Eventoj :

«La 4-an de Majo de tiu ĉi 1996-a jaro, la urbaj instancoj de Aix-en-Provence, apud Marsejlo en suda Francio, starigos memorigan slabon honore al L. L. Zamenhof. Tion nia grupo atingis post multjaraj klopodoj.

La monumento konsistas el duoncirkla granita bloko kun bronza medaliono reprezentanta la kapon de Zamenhof en juna aĝo. Ĝi surhavas duoblan surskribon, en E-o kaj en la franca lingvo, pri la fakto, ke li kreis Esperanton, la internacian lingvon, en 1887. Oni lokigos tiun blokon ĉe la vojkruciĝo de du stratoj : rue des Espérantistes (strato de la Esperantistoj) kaj alia avenuo de nia urbo. Tie centre kuŝas vasta cirklo kun herboj kaj arboj. La monumento staros piede de unu el la tieaj pinoj.»



1



2



3



3



3

Le rédacteur tient à remercier chaleureusement Nathalie Lemelle, du Service Guides Conférenciers de l'Office de Tourisme d'Aix-en-Provence, qui a bien voulu photographier pour lui les 5 vues ci-dessus et en permettre la diffusion dans "Espéranto-Provence". (Office de Tourisme - 300 avenue Giuseppe Verdi - 13605 Aix-en-Provence - [www.aixenprovencetourism.com](http://www.aixenprovencetourism.com))

## Paĝo de la komencantoj

### vortfarado - formation des mots

Sans doute avez-vous souvent dit "Bonne année" dans les premiers jours de janvier. Avez-vous eu l'occasion de le dire aussi en espéranto ? Si oui, qu'avez-vous choisi : "Bonan Novan Jaron" aŭ "Bonan Novjaron" ?



### klarigoj / atentigoj

**1 – pourquoi «n» à la fin de chaque mot de ces expressions ?** > parce qu'un verbe est sous-entendu.

Dans la phrase "Mi deziras al vi bonan novan jaron !", "bonan novan jaron" est le complément direct du verbe "deziras" et prend donc le "n" de l'accusatif, comme dans "Mi manĝas pomon."

C'est la même règle avec "Saluton !" = "Mi donas al vi mian saluton !"

**2 – «nova jaro» ou «novjaro» ?**

Je vous conseille d'utiliser "nova jaro" et donc de dire "Bonan novan jaron !".

En espéranto, il n'est pas possible de former un mot en combinant un nom avec un adjectif.

"Je mange un plat chaud." = "Mi manĝas varman pladon." (et non : varmpladon)

"J'ai lu un roman captivant." = "Mi legis absorban romanon." (et non : absorbromanon)

Alors, pourquoi rencontre-t-on parfois "novjaro" ? Est-ce une erreur ? Pas vraiment, car quelques adjectifs n'obéissent pas aux règles de la formation des mots et peuvent être utilisés comme préfixes. On trouve parfois les mots "novluno" ou "novmonato", que l'on accepte car ils sont devenus habituels, mais il est sage de ne pas créer de nouveaux mots sur ce modèle.



### Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Esperanto-Info*

#### 1 - gramatika

a) Ĉu vi iros ..... ?

1 - tio ; 2 - tie ; 3 - tien

b) Restu tie kaj ne iru en la salon.....

1 - ~o ; 2 - ~on ; 3 - ~e

c) Atentu, por ke vi ne fal.....

1 - ~u ; 2 - ~as ; 3 - ~os

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "agiti", "diskuti" aŭ "svingi" por traduki la francan "agiter"

1 - son mouchoir : .....

2 - l'opinion : .....

3 - une question : .....

d) elektu "aprobo", "konsento" aŭ "ornamaĵo" por traduki la francan "agrément"

1 - approbation : .....

2 - consentement : .....

3 - ornement : .....



### Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. Kiu estis la originala nomo de Esperanto ?

a- Lingvo Internacia b- Lingvo Universala

c- Transnacia Lingvo

2. En kiu lingvo originale aperis la Unua Libro de Esperanto ?

a- rusa b- germana c- pola

3. Kiu frisa muzikbando furoris en Esperantio ĝis la jaro 2010 ?

a- Kato b- Kajto c- Kaĉo

4. Kiomaĝa estis Zamenhof kiam li forpasis ?

a- 37 b- 47 c- 57

5. Kiu korelativa finaĵo signas posedon ?

a- es b- a c- el

6. Kiu estas la plej longa Azia rivero ?

a- Amuro b- Mekongo c- Jangzio

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a : 2 ; b : 1 ; c : 3

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1 : ŝajnigi ; ĉ2 : kortuŝi ; ĉ3 : afekti

d1 : agento ; d2 : oficisto ; d3 : aganto

### Solvoj de la demandoj

en EP 102 - aŭtuno 2015

### Superzam'

1 b > Akademio de Eo ;

2 a > 28 ; 3 c > Kajto ;

4 a > okulkuracisto ; 5 b > o

6 c > Volgo (3700 km)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### **Monika Arnaud**

Dankon pro tiu bunta kaj bele prezentita gazeto !  
Vi lerte kunmetas raportojn pri pasintaj eventoj, kaj anoncas venontajn eventojn ; vi bone uzis la informojn, kiuj aperas ĉe la TTT-ejo de *Espéranto-France*.  
*respondo de la red.*

*Jes, Monika, pasintaj kaj venontaj eventoj. Mi tamen ŝatus paroli iom pli pri la estonteco, kiu pli gravas ol la into... sed la informoj ne abundas. Dankon pro viaj afablaj vortoj pri nia gazeto !*

### **Olivier Faurax**

Estas bona gazeto ! Mi tute ĝojis legi ĝin !  
*respondo de la red.*  
*Se la legado de nia gazeto ĝojigas leganto(j)n, tio kompreneble plezurigas la redaktoron ! Dankon !*

### **Rose-Marie Quintin**

Laŭ mi, la paĝo por komencantoj utilas ne nur por ili.  
Dankon.

*respondo de la red.*

*Mi foje dubis pri la utileco de tiu paĝo. Via rimarko instigos min plu cerbumi pri novaj gramatikaj klarigoj kaj pliaj demandoj.  
Dankon al vi pro la kuraĝigo !*

### **Roselyne Favier**

Dankon pro la sendo de la gazeto. Ankaŭ mi partoprenis en la Lilla kongreso, sed tie mi ne konis sufiĉe da Provencanoj por esti kun ili sur la foto ; mi ne eksciis pri tiu komuna momento. Ne gravas, mi bone babilis kun multe da aliaj personoj el diversaj landoj, estis ja mia celo. Estis mia unua internacia kongreso. [...] Kuraĝe mi ĵetis min en la movadon kaj rapide povis bone partopreni en diversaj kursoj aŭ prelegoj. Sed mi ankoraŭ devas multe labori por bone kompreni, skribi kaj paroli Esperante. [...] *respondo de la red.*

*Dankon pro via longa mesaĝo, Roselyne ! La fakto, ke vi ne hezitis skribi pri via sperto koncerne la 100-an UK-on, estas jam bona paŝo al baldaŭa plena posedo de nia lingvo. Kuraĝon al vi sur tiu vojo !*



## À noter sur votre agenda

### **dans notre fédération**

**1er jeudi de chaque mois** - Marseille:  
Café linguistique à l'Equitable Café,  
54 Cours Julien, 13006 Marseille  
**mars 5-12** - Les Issambres (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno  
**mai 5-8** - Marseille (13) : Congrès national d'Espéranto-France (infos dans le n° suivant)

### **en France**

**février 22-26** - Bouresse (86) – Kvinpetalo : pratique de la langue à plusieurs niveaux avec Anne-Sophie Markov  
<http://www.kvinpetalo.org>  
**mars 19-20** - Arrout (09) : stage 3 niveaux, pour découvrir la langue ou se perfectionner  
**avril 8-16** – Baugé (49) – château de Grésillon : cours intensifs du printemps, avec examens  
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=eo>

**avril 17-22** - Colmar (68) : 3ème Migration de printemps - randonnée à travers les vignes de l'Alsace  
<http://orapado.wifeo.com/migrado-en-burgundio.php>  
**avril 20-24** - Baugé (49) - château de Grésillon : rencontre chorale Interkant  
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique17&lang=fr>

### **en Europe**

**mars 25 - avril 1** - Bad Hersfeld (Allemagne) : PSI, semaine internationale du printemps  
<http://luminesk.eo.tel/>  
**juillet 16-23** - Herzberg-am-Harz (Allemagne) : 89ème congrès de SAT  
<http://sat89.esperanto-urbo.de/>  
**juillet 23-30** - Nitra (Slovaquie) : 101ème Congrès Universel d'UEA  
<http://www.nitra2016.sk>  
**juillet 30 - août 6** - Nyíregyháza (Hongrie) : 49ème conférence d'ILEI  
<http://www.ilei-mondo.info/>